

# VERDA FAMILIO

NEPRAVIDELNÝ dvojjazyčný zpravodaj Esperantského kroužku v Mnichově Hradišti,  
pro členy kroužku a příznivce mezinárodního jazyka.

Odpovědný redaktor – MUDr. Josef Hradil, 29501 Mnichovo Hradiště, Družstevní 1161

Cena: dobrovolný příspěvek

Podávání novinových zásilek povoleno Oblastní správou pošt Střední Čechy v Praze,

čj.P/Fiš-2295/92 ze dne 16.XI.1998

[illegible][illegible]

Ĉu vi kapablas argumenti por Esperanto? (Daŭrigo) Ni daŭrigas la bazan propagandan lernejon de esperantistaro per plua kutima riproĉo kontraŭ IL (Internacia lingvo): „Esperanto estas nur ludilo.“ Oni diras, IL estas konvena ludilo por infana korespondado, samspeca (stejného druhu) kiel krucenigma (křížovkářské) arto. Ni diru tamen, ke tio estas nur unu el ĝiaj avantaĝoj. Infanoj vere kapablas post finstudo de 14-taga tendaro en Lančov sen granda peno eltrovi amikon en la dezirata lando kaj korespondi ku li. Alia problemo estas, ĉu niaj landaj organizaĵoj kapablas organizi adresaron de korespondemuloj. Ne estas tiel kaj tio atestas pri nia malbona organiza kapablo. Tamen, se niaj kontraŭuloj diras moke „infana ludilo“, ni povas demandi rebato (zpětným úderem) pri la daŭro de studado de aliaj lingvoj antaŭ ol la infanoj povas serioze kuraĝi ekkorespondi angle ol alilingve. Eĉ se restus tiu avantaĝo de Ilo sola, oni valorus lerni ĝin, ĉar neniu alia lingvo kapablas krei internacian amikecan ligon tiel facile kiel Ilo. Spertaj esperantistoj, kiuj ne plu aktivigas (tiaj estas malmultaj), ĉar kutime la amo por Eo daŭras ĝis al lastaj tagoj de la vivo kontraŭe: maljunaj homoj, kiuj malsanas kaj ne estas movkapablaj (pohybliví) ofte elserĉas malnovajn koresponaĵojn kaj provas reaktivigi siajn malnovajn amikecojn), taksante sian vivon starigas antaŭ si demandon, ĉu estis utile instrui infanojn, ĉar intereso de infanoj estas efemera (pomíjivá) kaj multaj dum senpagaj kursoj ĉesas lerni kaj perdas kontakton kun nia movado. La instruado de Eo estas ĉiam sencohava (smysluplná), ĉar krom la propedeŭtika lingva efiko ĝi greftas al la infana animo ideon de internacia amikeco kaj kunlaboro, kiu gvidas kaj formas pluan evoluon de ilia formebla (tvarovatelné) animo.

Aliaj riproĉantoj mokas, ke Eo estas nur hobia aŭ lingva por hobiistoj, netaŭga por alia serioza uzo.

Nomi Eon hobia ĉiam estas ofendo por „internacia ideo de Eo“ kaj atestas nur pri supra kono pri problemaro de internacia interkompreniĝo kaj subtakso (podcenění) de klopodoj de esperantista popolo. Ili scias pri la INTERNA IDEO de Eo, pri valoro de amikaj rilatoj kiuj kreiĝis inter niaj socioj. Vere, ni estas socio de internacia popolo, kiu stariĝas la celon de internacia interkompreniĝo super siajn ambiciojn kaj personajn dezirojn. Ni ja povus „pli ekonomie“ uzi nian liberan tempon kaj dediĉi ĝin por kutimaj amuzoj, kiuj el vidpunkto de eterno estas senvaloraj. Nin varmigu sento, ke ni dediĉas nian vivon por ideo sencohava. Kvankam ĝi ankoraŭ ne estas de la publiko sufiĉe akceptata precipe pro nekomprene de ĝia ideo, la historio taksos ĝin valora, edukanta al nobliĝo de la homa animo. Tamen, kial riproĉi, ke Eo estas lingvo por hobiistoj? Ofte amatoroj kreas artajn verkojn, kiuj eĉ superas tiajn de profesiuloj. Per uzo de internacia lingvo ili ariĝas (aro, iĝi - shromažďují), povas facile interŝanĝi spertojn, kiuj mankas al ili, ĉar ili ne havas profesion edukitecon.

Oni ofte diskutas pri la senco de Ilo. Laŭ la grado de lingvoscio de la uzanto ĝi estas komence nur lingve koresponda, kiu bezonas vere nur malgrandan tempon por lerni bazajn principojn. Poste oni povas profesie uzi ĝin en sia fako – Eo estas la plej konvena lingvo por teknika kaj scienca interkompreniĝo. Sciencistoj nepre atendis inventon (vynalezení) de konvena interkomprenilo. Multaj opinias, ke ne estas necese lerni artefaritan lingvon, ĉar sciencistoj uzas ĉiukaze nur fragmenton de la vorta provizo el ilia praktika esprimado. Profesoro Leopoldo Infeld, teoriisto pri fiziko, plurjara kunlaboristo de fizika genio Albert Einstein, skribis, ke la angla lingvaĵo de Einstein enhavis ne pli ol 300 vortojn. Kaj la angla ja estas lingvo de Unuiĝintaj ŝtatoj de Ameriko, kiun ĉi eminenta sciencisto elektis je sia patrujo kaj kie li loĝis de la jaro 1933 ĝis sia morto en la 1955 jaro. En tiu lando Einstein vivis kaj krie laboris en sia scienca branĉo, ne parolante lingvon de sia nova patrujo. Kvankam li ne kapablis interkompreniĝi dum kutimaj lingvouzoj en surstrata kaj komerca eĉ privata vivo, lia lingva provizo sufiĉis por interkompreniĝo inter sciencistoj – fizikistoj. Kelkaj adeptoj de scienco en sia junaĝo entuziasme lernis Eon, tamen transirante en la sciencistan mondon, ili uzis aliajn lingvojn kaj ili rememoras Eon kiel revo (sen, blouznění) de sia juneco, kiun ili plene forgesis, kvankam ili restis ĝiaj favorantoj. Problemo bazas en tio, ke ili estas malmultaj kaj ne kuraĝis enkonduki Eon en scienca uzon. Necesa ardiĝi (rozežhavit se), kvankam primokite (posmívání), tamen aranĝi sciencajn konferencojn, kie estas Ilo la lingvo labora, propagandi la uzon de Eo en sciencajn laboraĵojn, almenaŭ por resumaj finpartoj. Ĉiun scienciston ĝojigas, se li legas alilingvan tekston de lia fako, kiun li komprenas sen uzo de vortaro. Tia Eo estas – ĝi estas sola, kiu povas servi tiusence. Per uzo en scienco kaj tekniko ĉesas esti Eo nenieslingvo (ničí jazyk) kaj komencas la periodo de ĝia praktika uzo. Dum lastaj jaroj estis tiudirekte faritaj antaŭpaŝoj, kiun komencis kaj al kiu helpis apero de granda Plena Ilustrita Vortaro kaj sekvaj fakaj vortaroj, Bildvortaro de Eichholz kaj aliaj. La fundamento estis metita, restas helpi al ĝenerala apliko de Eo. (Daŭrigota)

Malfacile ricevas Esperanto en ŝtatoj de iama Sovetunio. Pro ti ni ĝojas, vidante pluan numeron de KOMENCANTO, modesta bulteno por korespondaj kursanoj kaj komencantaj esperantistoj. En la naŭa numero ĝi informas la junajn esperantistojn pri Tutmonda esperantista ĵurnala organizo – junulara sekcio de UEA (TEJO) kaj ĝia organiza strukturo. Por faciligi kontakton inter komencantaj esperantistoj, la redaktorejo volonte aperigos vian adreson. Vere estas interese kontakti kun tiu granda lando, kiu travivas sian transformiĝon, kaj gajni fidelajn amikojn en ĝi. Ni ĉiam nur miras, kiom da altkvalitaj esperantistoj transvivis epokon de persekutado kaj konservis sian altan lingvan kvaliton – eble dank' al bonkvalitan lerniloj kaj vortaroj, kiuj estis eldonitaj en la gloraj jaroj de la „rusa periodo“ de esperanta historio. Jen la adreso, kien vi povas skribi, instigi la eldonanton kaj sendi vian korespondadreson: KOMENCANTO, redaktoro Viktor Kudrjacev, Box 132, Ekaterinburg, 620041 RUSIO.

KATA EPIZODO. Humura lingvaĵo de karmemora Teo Novotný el Liberec (\*3.1.03a - + 17. XII. 74). Foje vivis du maljunaj fraŭlinoj. La unua nomiĝis Kat-arino kaj la dua Kat-harino. Por ke ili ne sentu sin tion forlasitaj kaj solecaj, aĉete ili akiris unu belan katon. La kato estis tiom hela – vera unikato. Sed ili denove malkontentis pro soleco de tiu bela kato kaj aĉetis la duan katon – ili do havis du-katojn. La bonkoraj najbaroj donacis al la virinoj du pliajn katojn, tamen ne dupliktatojn. Ilia frato, eksciinte pri ilia katemo, donace alportis al ili unu katon, do ĝi estis de li kato. Tiu de li kato ofte hejmen alportis musojn. Tio vere ne estis delikata agado de tiu muskato. Tiun, ĉiam vagantan maldelikatan muskaton, ili volis beligi – lavi kaj kombi, sed la kato estis sovaĝega, la maljuniloj devis ĝin teni kaj tiu katteno estis pena. Malgraŭ tio tiu katakombo estis tamen malsukcesa kaj la kato forkuris. La virinoj la forkurintan kataĉon logis per viando. Post longa proceduro la katalogo sukcesicis. Post la lavado kaj katakombo la samon travivis ĉiuj aliaj gekatoj kaj estis sekataj per kat-sek-tukoj; por ke ili ne malsaniĝu pro kataro, la virinoj kovris la katojn per trikataj kat-dors-kovriloj. Vesperigis kaj la tuta kataro katkantis – miaŭsis – unju strofon post la alia. Tio estis vera katastrofo por najbaroj.

SAT-Kongreso 1993 okazis dum belaj aŭgustaj tagoj en Kazanlak (Bulgario). Post salutoj de delegitoj de partoprenintaj landoj salutis la kongreson 13-jara knabo Václav Hranický en nomo de E-klubo en Ostrava Poruba kun granda aplaŭdo. La programo de la kongreso estis tre bunta. Krom ĝeneralaj kunsidoj kunvenis diversaj sekcioj, ekz. liberpensiuloj, liberecanoj (iamaj anarkistoj), vegetaranoj, okazis interesaj prelegoj. Dum unu vespero kantis populara „belega najtingalo“ Nikol, kiu montris, ke eĉ Eo havas sian kulturon. Okazis ankaŭ bulgara vespero, kie kantis, dancis kaj muzikadis popularaj bulgaraj grupoj.

SAT-KONGRES 1993 byl během krásných srpnových dní v Kazanlaku (Bulharsko). Po zdravici delegátů zúčastněných států pozdravil kongres 13-letý chlapec Václav Hranický jménem E-klubu v Porubě-Ostrava s velkým potleskem. Kongresový program byl pestrý. Kromě valných hromad zasedaly různé sekce, např. volnomyšlenkáři, svobodní členové (dříve anarchisté), vegetariáni, byly uspořádány zajímavé přednášky, jeden večer zpíval „belgický slavík“ Nikol, který ukázal, že i Esperanto má svoji kulturu. Byl uspořádán také „bulharský večer“, kde zpívaly, tančily a jinak hudebně vystoupily populární bulharské skupiny.

Lastajn du vesperojn preparis ĉeestantoj de la kongreso per siaj programeroj. Dum kongreso okazis ekskursoj al muzeo de rozoj, historia loko Ŝipka, kie venkis bulgaroj kaj rusoj turkojn, plus al Plovdiv kaj Veliko Tarnovo. La kongreson komence organizis 82-jara Ganĉo Damjanov kun sia filino Svoboda, poste helpis ankoraŭ kelkaj volontuloj. La ĉeĥa ekspedicio loĝis en hotelo kaj ricevadis bongustan vegetaran manĝon. Venontjare SAT-kongreso okazos en Sud-Moravia urbeto Strážnice inter la tagoj 16.-23.VII.1994. Peranto por SAT en Ĉeĥio estas Vlád'a Hasala, pk 36 CZ-69662 Strážnice, kiu donos al Vi pluajn informojn.

Helpo al historiistoj. „Survoje al Internacio de proleta Esperantistaro“ Adolf Schwarz, Sofio: Pres-Esperanto, 1992, 223p. La aŭtoro kun la vera redaktoro de la libro Nikola Alexiev priskribas historiajn faktojn pri la laborista E-movado, fondita per SAT dum UEA kongreso 1921 en Prago. La plej granda parto koncernas laŭ la recenzanto Detlev Blanke la komunisman opozicion en SAT, fondon de Internacio de Proleta Esperantistaro en 1932 en Berlino, kiu signifis spliton de la laborista E-movado. Estas menciita persekuto kaj en Tria regno kaj en Sovetio. La kunaŭtoro Alexiev akompanas ĉiun ĉapitron per sia enkonduko, en kiu li faras ankaŭ severan memkritikon pri la pasintaj kredoj kaj iluzioj. Li konkludas per alvoko: „Nenia splitiĝo plu en la vicoj de la monda esperantistaro! ... Ni memoru kaj ne forgesu eĉ por momento: la unueco faras forton!“

Poslední dva večery připravili účastníci kongresu svými programovými čísly. Během kongresu byly uspořádány výlety do muzea růží, do Plovdivu a Veliko Tarnovo a historického místa Šipka, kde porazili Bulhaři s Rusy Turky. Kongres spočátku organizoval 82-letý Ganĉo Damjanov se svou dcerou Svobodou, později pomohlo ještě několik dobrovolníků. Česká výprava bydlela v hotelu a dostávala chutnou vegetariánskou stravu. V příštím roce SAT-kongres bude uspořádán v jihomoravském městečku Strážnice ve dnech 16–23.VII.1994. Zástupce SATu v České republice je Vlád'a Hasala, ps 36 CZ-69662 Strážnice, který Vám podá další informace.

Pomoc historikům. „Cestou k internacionále proletářských esperantistů“ Adolf Schwarz, Sofie: Pres-Esperanto, 1992, 223 str. - Autor společně se skutečným redaktorem knihy Nikitou Alexievem popisuje historická fakta o dělnickém esperantském hnutí, založeném SATem při UEA kongresu v r. 1921 v Praze. Největší část podle recenzenta Detleva Blanke pojednává o komunistické opozici v SATu, založení internacionály esperantského proletariátu v r. 1932 v Berlíně, které znamenalo roztržství dělnického esperantského hnutí. Je popsána persekuce v Třetí Říši i Sovětském Svazu. Spoluautor Aleksiev doprovází každou kapitolu svým úvodem, ve kterém činí též ostrou sebekritiku pominuvších přesvědčení a iluzí. Uzavírá výzvou: „Žádné rozštěpení v našich řadách světových esperantistů! ... Vzpomeňme a nezapomeňme ani na okamžik: v jednotě je síla!“

„Monto, monto ...“ popolkanto – tradukis Miloslav Lukáš. - Monto, monto la tro alta//kaj knabino malproksima;//malproksima post montaro//velkas inter ni la amo.///Velkas, velkas ĝis finvelkos, poste nia amo estos//granda por ni la malĝojo,///kaj nenio plu en vojo.

La Universala Kongreso de Esperanto (78a) 1993 okazis en Valencio (Hispanio) inter la tagoj de 24a ĝis 31a de julio kun plena sukceso. Ĉeestis 1800 partoprenintoj, kvankam terura varmo de 38°C bremsis entuziasmon de aŭskultantoj. 100 programerojn atendis la vizitantojn. Dum la kongreso aperis kelkajn novaĵoj de struktura karaktero. Ne estis prezentita la tuta trarigardo pri agado de esperantistoj, sed nur la raporto de la estraro. Detalaĵojn sopira esperantisto povas legi en la aŭgusta numero de ESPERANTO, oficiala gazeto de Universala Esperanto Organizo, kaj en Heroldo, kiu jam tradicie plej detale informas siajn legantojn pri la plej granda evento esperanta de la jaro. Ĉiu havis rajto demandi estraron en publikaj kunsidoj. Estis akceptita reaniĝo de Urugvaja E-Societo, kiu demonstracie aliĝis el UEA en la jaro 1974 post la kongreso en Hamburgo, kiam Ivo Lapenna forlasis la estraron. Komitato akceptis proponon pri novaj 9 honoraj membroj (inter ili kelkaj pli konataj: Werner Bormann kaj Richard Hirsch (Germanio). Mihail Mandrik (Belorusio), Gregorie Maertens kaj Edward Symoens (Belgio) kaj aliaj (precipe el Fora Oriento). Oni longe diskutis, ĉu por antaŭenigi la aferon de E-o en nova strategio de UEA estas necese prioritati propagandon, aŭ subteni internan vivon de komunumo. Formala decido fine ne akceptiĝis, tamen la temo mem influis multajn aliajn traktotajn proplemojn dum la semajno. Estis definivigita la pasintjara provizora decido rabati la membrokotizon por evoluantaj kaj malpli riĉaj ŝtatoj per unuvoĉa balotado. Regularo de Terminologia E-Centro estis „frostigita“; por gvidi la agadon de TEO por 2 jaroj estis nomumita komisiono (W.Bormann, I.Jackson kaj A.Wandel). Se vi volas ricevi detalan raporton pri la 78a UKo, skribu al la redakto, de HEROLDO, N. Sandre 15, I-10078 Venaria R.(TO), petante la propagandan kongresan numeron

78. Světový Kongres Esperanta byl uspořádán ve Valencii (Španělsko) ve dnech 24. až 31.července s plným úspěchem. Bylo přítomno 1800 účastníků, ačkoliv strašné vedro 38°C bránilo nadšení posluchačů. Návštěvníky očekávalo 100 částic programu. Během kongresu objevilo se několik novinek strukturálního charakteru. Nebyl předložen úplný přehled o činnosti esperantistů, nýbrž jen zpráva předsednictva. Detaily může se dychtivý esperantista dočíst v srpnovém čísle ESPERANTa, oficiálního časopisu Světové esperantské organizace, a v HEROLDu, které už tradičně nejpodrobněji informuje o největší esperantské události roku. Každý měl právo se ptát předsednictva ve veřejných schůzích. Bylo přijato opětovné členství Urugvajské E-asociace, která demonstrativně vystoupila z UEA v roce 1974 po kongresu v Hamburгу, když Ivo Lapenna opustil předsednictvo. Předsednictvo přijalo návrh nových 9 čestných členů (mezi nimi několik známějších: Werner Bormann a Richard Hirsch (Německo), Mihail Mandrik (Bělorusko), Gregorie Maertens a Eduard Symoens (Belgie) a jiní, zejména z Dálného Východu. Dlouho se diskutovalo, zda pro progresi Esperanta v nové strategii UEA je nutné upřednostnit propagaci, nebo posílit vnitřní klubový život. Nakonec formální rozhodnutí nebylo přijato, avšak téma samo o sobě ovlivnilo mnoho jiných projednávaných otázek během týdne. Definitivním bylo učiněno loňské prozatímní rozhodnutí poskytnou slevu na členském poplatku vývojových a chudších států jednohlasnými volbami. Pravidla Terminologického E-Centra byly „zamrazeny“; pro vedení činnosti TEO na dva roky byla jmenována komise: W.Bormann, I.Jackson a A.Wandel. Jestliže chcete obdržet podrobnou zprávu o 78.Světovém kongresu, napište redakci HEROLDa, N. Sandre 15, I-10078 Venaria R. (TO), žádající propagační kongresové číslo.

La plej ofta

**Eventoj**

Internacia movada gazeto por aktivaj  
esperantistoj

Aperas dusemajne, legata en pli ol 40 landoj ...

Petu senpagan provekzepleron de:

LINGVO-Studio, pk. 87. H-1675 Budapest, Hungario

PREPOZICIOJ (Gramatikaĵo) – daŭrigo – vidu la lastan Verdan Familion. - Plua prepozicio, kiun ni pritraktos estos APUD. Ĝi estas prepozicio montrata la netuŝan proksimecon, kaj pli precize la personon aŭ objekton plej proksiman al la priparolato: stari apud la patro (Zamenhof, plue Z); li sidas apud la tablo kaj dormetas (Z); oni starigis la florpoton ĉe la fenestro tute apud lia lito (Z); ĝian korpon kun ĝiaj plumoj ĵetu apud la altaron en la cindrejon; oni komencis praktiki la holandajn metodojn de medicino apud (=paralele kun) la ĉinaj; Volapik estas simpla fuŝaĵo apud Esperanto. Apud – signifas ankaŭ objekton en pli malpli granda najbareco: Apud propra domo ŝtelisto ne ŝtelas; estis varmega batalo apud Lepsiko (Z); li naskiĝis en malriĉa vilaĝo apud Sendai. - Rimarko: Inter apud kaj ĉe (en ties loka signifo) la diferenco estas la sama, kiel inter super kaj sur: li havis glavon ĉe la femuro kaj lancon terpiki apud li; mi ne loĝas ĉe mia frato, sed mia loĝejo estas apud la lia. - APUDA- vortero kun la sama signifo: loĝi en la apuda kvartalo. - APUDE – en la proksimeco: pli bona apuda najbaro ol frato post la arbaro (Z) – tion montris la apude pedanta pli granda pentraĵo li starigis botojn apude de siaj (Z); vidu ĉiapude. APUDESTI – esti en apudeco.

CIS – neologisma prepozicio, montranta lokon kuŝantan pli proksime, ol la objekto, kiu estas komplemento de tiu prepozicio; = maltrans: lia bieno sterniĝas cis la rivero, ĝis la landvojo. Restu cis tiu linio! (aŝ k). Derivaĵo: samsignifa prefikso: cisalpa, cisdanuba.

ĈE – prepozicio esprimanta la ĝeneralan ideon de senpera tuŝeco, kaj pli precize montranta:

1. tre proksime en la spaco: sidi ĉe la tablo; du mastrinoj ĉe unu kamenoj; kiu ĉe l'voj konstruas, tiun ĉiu instruas; loĝi ĉe (=en) la strato N. (Z); kapti iun ĉe la brako; restu tajloro ĉe sia laboro. -

2. parolante pri la homoj ĈE signifas: „sur la korpo, en la korpo, sub ies instruo, en ies verko, en institucio, ekz.: Ĉe iu alfalis haroj. Seriozeco anstataŭis ĉe ŝi gajecon. Mi lernis ĉe tajloro. Mi loĝas ĉe mia frato. Ĉe Cervantes oni trovas erarojn. Profesoro ĉe la universitato. Ĉe ni estas belaj montaroj. -

3. Samtempecon: ĉe la sunsubiro. Li malfermis ĉe mia alveno. Ĉe la komenco. Li estis kaptita ĉe la freŝa faro kun peko en la mano. Li ne kuraĝis paroli ĉe la alesto de la majstro. -

4. „hejme“: Mi estas ĉe mi. Mi iras ĉe min. -

5. Ke oni ion kunportas: Ĉu vi havas ĉe vi alumetojn? Mi ne havas ĉe mi kombilon. -

6. Interrilatecon inter la cirkostancoj: Labori ĉe lumo de la lampo. Ĉe la tablo malplena babilo ne fluas. Dormi ĉe malfermitaj fenestroj. Plezuri ĉe muziko. Ofte ĉe vesto velura doloras stomako. - ĈE estas uzata kiel prefikso, ekzemple: ĉeesti (=alesti); havi ion ĉemane (tute pretan ĉe la mano.)

## KIEL DIRI

PRAKTIKA ESPERANTA FRAZEOLOGIO. Kompilis LENTAIGNE (Daŭrigo). Temo: KONGRESO: Ĉeesti per propra korpo (být osobně přítomen) kun karno kaj ostoj. Malfermi solene la kongreson. Deklari la kongreson malfermita. La procesio de delegitoj. Havi festan paroladon, kiu estis kulmino de la kongreso. La arto de parolado. Li estas oratoro pli el naturo ol el arto. „... Ĝi estas sonoj de io granda kiu naskiĝas“ (Unua kongreso, Bulonjo ĉe Maro, 1905). Post la parolo de la prezidanto, la agoprezidanto malfermis la kunsidon. Oni komencis la tagordon. La buroo konsistas el la prezidanto (esti prezidanto nur pro formo), la vicprezidantoj kaj la sekretarioj de la kvar komisionoj. Kvorumo (poměr hlasů) atingita. Transiri al la problemoj. Ataki demandon, problemon. Partopreni en la brila, vigla diskuto. Penetri ĝis la koro de la temo. Proklami siajn principojn en la kunveno. Persisti, stari fidele ĉe siaj principoj. Akcepti tekstojn (tezojn), kiel bazon de la diskuto. Konsenti principe kun iu. Kolekti opinion de amikoj. La nun diskutata kazo. La parolo apartenas al li. Apogi, subteni proponon. En tiu propono kuŝas la solvo de la problemo. Trovi ĝeneralan. Tiu propono estas laŭ mia opinio tre prudenta (rozumný). Esprimi malaprobos (neschválení, nesouhlas). Febra diskuto. Diskuti kun fajro. Dron en detaloj. Malforta flanko de la argumento. Postuli neeblaĵojn. Havi la lastan vorton en la diskuto. Protesti kontraŭ per manoj kaj piedoj. La demando ne estas sufiĉe maturiĝinta. Tio tuŝas la esencon mem de la demando. La kerno de la demando. Lasi flanke la demandon pri ... Fortaj argumentoj. La malforto de la argumento senhava (bezobsažný). Refuti, senvalorigi la argumenton per lerta kritiko. Finfine la tuta malkonsento redukiĝas al diskuto pri la senco de unu vorto.

Popolaj proverboj. Eĉ la kokido ne rastas senpage ... Ke la lupo satmanĝu sed la kaprino restu tuta. Sen laboro ne estas kukoj. Sen mono gastejon en eniru. Muelejoj de Dio muelas malrapide, tamen certe. La ĉemizo estas pli proksima ol la jaketo. Beataj estas sprite malriĉaj, ĉar ilia estas la regno de Dio. Diablo dormas neniam. Estimiu vian patron, kiel vi mem.  
(sendis Běla Koutková, Bělkovice)

### Korespondi deziras:

Mallongiloj (Zkratky) bk=bildkartoj; ĉt=ĉiu temo; d=deziras; iŝ=interŝanĝi; its=interesiĝas; jj=jaroj; ko = kolektas; kor = korespondi; m = muziko; pm = poŝtmarkoj; s-ano = samideano; s-ro = sinjoro; s-rino=sinjorino; tm=tutmonde.

16-jara knabino interŝiĝas pri libroj kaj historio, kol bk pri urbo j: Tanja Motrunich, Medvedeva 14, UKR-265411 Beresno, Rovenskaja oblast, Ukrainio.

14-jara lernanto ŝatas librojn, plantojn kaj bestojn: Beata Szmetena, Hirsch u.8, H-3910 Tokaj, Hungario.

14-jara knabo its pri libroj kaj akvaj sportoj: István Rombács, Szabadság, ut.43, H-3910 Tokaj, Hungario.

Inĝeniero Mariano Jústiz Luna, Calle primera Nr 5, Ave Garzón y calle i Apto Sueno, Santiago de Cuba 9, C.P. 90900, Kubo

Doktorino kuracistino de okuloj: Donika Plegi, M.Gjollesha P 64/1, shk.2, ap 10 Tirana Albanio.

Tanzania distriktestro pri kultura kaj arta edukado de junularo, 47-jara dez. kor pri arto (petrado, skulptado, bildpresado), skoltado, tradiciaj dancoj kaj m, katolika kaj luterana religioj. Leonard E. Sekibaha, District Cultural Officer, Pangani District Council, P.O.B.69, Pangani, Tanzanio.

Ĉu vi ŝatus kor kun Niĝerio? Zamenhofa Grupo, ZEGO, Box 6490, Aladinma, Oweri, Imo State, Niĝerio.

Korespondemuloj: Anoncu senpage en KORESPONDI. Petu specimenon. MELO, 34 Avenue Russie, F-03700 Bellerive.

Korespondamikon el Koreio petu ĉe Koreia Esperanto Asocio, CPO Kesto 5154 Soul, Suda Koreio. Katja Belcheva, gvidantino de Internacia Koresponda Klubo (servo) serĉas kontaktojn al similaj kluboj, servoj dise en la mondo: Pk.5, ul. Zvezda 53, BG-4002 Plovdiv, Bulgario.

25-jara sinjoro d kor pri ĉt. M. Abaidullah, DK 915 Dhoke Paracha S. Town, Rawalpindi, Pakistano F-ino Fraza Khan, P.O.Box 1261 Rawalpindi, Pakistano.

Umesh Man Bayracharya, Ka-I-222, bhota Bahal, Kathmandu, Nepalo.

Geparo (24jara juristo kaj 21jara bibliotekistino) its pri multaj esp. kaj eksteresp. temoj, pri muziko: Pavel kaj Jelena Skiba, pk 60, RUS-64407 Omsk, Rusio.

34jara elektristo, edzo, its pri turismo kaj filatelio. Stanislaw Broniewski, Stalingradska 20m, 112, PL-03488 Warszawa, Polio.

Kastora klubo havas sian korespondan servon – senpagan. Oni nur sendu informojn pri nomo, adreso kaj aĝo; tiujn ĉi informojn oni emetos en la klubajn bultenojn kaj en la kluban adresaron.

14jara knabo d kor pri turismo, matematiko, lingvoj. Csaba Csákó, Szanto Kovács str. 28 II/6, H-4400 Nyiregyháza, Hungario

Hektor Jimenáz, Ave 47, Nr 3803 e/48 y 40, Rpto, Kohlly Playa La Habana , Kubo d itŝ spertojn pri la instruado de E-o en lernejoj kaj korespondaj kursoj.

Filologo kaj ĵurnalisto pri esperantologio, gazetara laboro kaj historio de la E-movado: Juan Ramon Rodriguez Gomez, Aptdo 189, Plaza de la Revolucion C-10600 La Habana, Kubo.

14-jara lernantino pri libroj kaj biciklado: Helga Kék, Deák u. 11, H-3910, Tokaj, Hungario.

XXXXXXXXXXXXXXXXXXXX  
XXXXXXXXXXXXXXXXXXXX  
XXXXXXXXXXXXXXXXXXXX  
XXXXXXXXXXXX  
XXXXXXXXXX  
XXXXXXX  
XXXXXX  
XXXX  
XXX  
X

Esperantský klub  
CZ 29501 Mnichovo Hradiště